



EKO 2021-18 sendita el Budapeŝto la 11an de majo.

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

AMO 73: Diligenta preparado ĉe IKEF!

La pretigoj por AMO 73 progresas. IKEF (nia faka asocio pri ekonomio kaj komerco) kompilis liston de ses prezentantoj, el kvar kontinentoj. Ni povos aldoni la kvinan kontinenton, se vi nur konstatas mian devenon.

La seminario okazos dimanĉon, la 30an de majo. Horo konfirmota. La teknika rimedo uzota estas Voov, kies instalado ne necesas. Ni provas akiri pli da informoj kiel funkciigi tion. Kiu volas aliron skribu al la patro de EKO kaj la la organizanto ĉe IKEF.

El la sekretarioj de IKEF, Yas Kawamura (Japanio) organizas la sezonan kunvenon (SK) kaj komunan kunvenon (KK/jarkunveno), kaj Chimedseren Enkhee (Mongolio) organizas la daŭran dimanĉan kunvenon (DK). S-ro Kawamura organizas kadre de tio la AMO-seminaron.

Jen la prezentantoj: por AMO 73:

- (1) Stefan MacGill, 5-minuta enkonduko.
- (2) Roland Rotsaert, honora prezidanto de IKEF prelegos pri la historio de IKEF, ĉar li estas unu el la fondintoj de IKEF, kaj sola restanto kun IKEF ĝis hodiaŭ.
- (3) Ĉielismo WANG Tianyi prezidanto de IKEF prelegos "Kiel mi vivlaboris internaci-komerce per Esperanto"
- (4) SABİYUMVA Jérémie (Burundo, kaj estrarano de UEA kun respondeco pri AMO) prelegos pri uzo de *Myriad* (ĉifromono) kaj komerco.
- (5) Fabina YU Ximei [vicprez.de](mailto:vicprez.de@ikef-cn) IKEF-CN prelegos pri Belaj Artobidoj
- (6) John Huang prez. de IKEF-Nordameriko prelegos pri Bela Ajlo

Nun en aktiva preparo estas la programoj de AMO-seminarioj 74 (VK), 75 (FR), 76 (BJ) kaj 77 (PL).

Laŭ informoj de Chielismo WANG Tianyi, prezidanto de IKEF

<http://www.ikef.info>

Retpoŝto: chielismo@hotmail.com

Unesko-enketo: esperantistoj diligentis

Nia komunumo montris sin engaĝita kaj reagema. Unesko rimarkis tion kaj esprimis ĝojon. Tion komunikas la Gazetara Komunikado de UEA, numero 950. Surbaze de tiuj respondoj, via komunumo konsideras, ke la ĉefaj tri defioj estas: 1) Klimata ŝanĝiĝo; 2) Ekonomiaj malegalecoj; 3) Armila konflikto/milito. Rigarde al la tri celoj de edukado [klerigado], oni elektis: 1) Homajn rajtojn; 2) Pacon; 3) Daŭripovon.

Verkistoj pri Afriko en Vikipedio

Lige kun la Internacia Tago de Afriko, celebrata ĉiun 25-an de majo, estas lanĉita konkurso pri verkado de artikoloj/ traduko de artikoloj al Esperanto pri Afriko en Vikipedio. Estas valoraj kaj finance interesaj premioj por gajni. Interesiĝantoj povas legi plie informojn kaj kondiĉojn pri la konkurso per:

https://esperanto.wiki/projektoj/afrika-monato-2021?utm_source=vikivojagho&utm_medium=anonnotice&utm_campaign=afrikamonato2021

Adje Adjévi

Baza varbilo por Esperanto plurlingve

Danke al la enretiga laboro de Andrej Grigorievskij kaj la tradukintoj, jam bazaj varbaj tesktoj en 11 versioj troveblas en <https://www.uea.org/teko/varbiloj>.

Renato Corsetti kaj la grupo ZPI.



Nia oficejo ĉe UN refoje informas

Informilo 51 – marto-aprilo 2021

La Esperanto-movado substrekas la gravecon de la gepatra lingvo

Idoniĝis fina raporto de MondaFest' 2020

Esperanto-parolantoj trovas siajn voĉojn

La Monda Organizo pri Sano (MOS) proponas kurson en Esperanto

UNESKO-Kuriero en Esperanto: Nova numero.

Iru al <https://uea.org/revuoj>. Tie la elŭto pluiros al la retejo de Unesko mem, por ke ili konstatu, kiom da homoj elŭtas la revuon,

alivorte, kiom esperantistoj subtenas Uneskon kaj la revuon.

Urugvajo raportas pri sia agado

Dum la pandemio nia grupo daŭris en kontakto pere de retaj rimedoj. Tiel ni faris kursojn kaj kunsidojn. Nur de antaŭ du monatoj ni decidis mallui nian sidejon ĉar pasis unu jaro en kiu ni ne povis renkontiĝi tie. Do, ni devis translokigi la bibliotekon al hejmo de kamaradino kiu ordigas kaj indeksas la librojn. Krome kelkaj el ni laboras en la historia arkivo de la societo, ordigante la plej malnovajn dokumentojn kaj ciferigante ilin.



Nun ni planas malfermi retan paĝon por ke ĝi estu la centro de nia agado. Momente ni lanĉis enketon inter la societanoj por scii precize kia paĝo taŭgus por ni. Kompreneble ni scias ke pli kompleksa paĝo estos pli da laboro kaj pli kosta, kaj tio povas esti limigo por la decido, sed estas interesaj ideoj, kiuj estus bele se ni povos realigi.

Sonja Risso el Urugvajo

Foto: Esperantistoj promenas kune el la nacia parlamento, kie okazis la malfermo de la Konferenco de ILEI en 2014.

<p>Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj</p>		<p>Redaktoroj: Stefan MacGill kaj Mirejo Grosjean</p>	<p>ENHAVO</p> <ul style="list-style-type: none">• AMO 73 kaj IKEF• Unesko enketo• Afrika verkado• UNESKO- kuriero• Urugvajo pluas
---	--	--	--

===== Vortoj: 575 =====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de marto 2021 (per EKO 2021-12).. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@ce>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.